

La Esperanto-Gironde Informilo



JANUARO 2019

N° 157

Feliĉan jaron 2019!



ESPERANTO-GIRONDE
ZAMENHOF-TAGO 2018
LA 13an DE DECEMBRO
je la 10a 30
EN CENON PALMER

Ceestis: Annie kaj Ĵanseb Brilleaud, Gloria Gargallo, Joël Lajus, Elvezio Canonica, Martine Edelbloude, Rose kaj Bernardo Sarlandie, Monique Dussenty, Klodin' Pomiról, Bruno Ferré kaj Marcelo Redoulez. Tagmeze venas Hélène Forget.

Elvezio senkulpigas neĉeeston de Janine kaj Yannick, Christiane kaj Michel, Lucienne, Morine kaj Pejo, ankaŭ Aŭrora.

Interŝanĝo de novaĵoj:

- Koncerne la ŝanĝon de la bankokonto: Fine alvenis la necesa agnosko de la Prefektejo, longe atendita, pri la modifo de la kasistino. Martine demandas, kiun agentejon de Credit-Agricole elekti kiel sidejon de la konto: ĉu en Cenon proksime al la sidejo? ĉu en Bordoza proksime al ŝia hejmo? Pluraj membroj esprimas sian aprobon fiksi la elekton laŭ la plej favoraj kondiĉoj por la kasistino. Martine do mem elektu... la agentejon Bordeaux-Bastide. Cetere devas esti fiksita baldaŭa rendevuo kun Elvezio (eblas mardon) post renkonto kun Morine por ŝanĝo de la ĉekujo.

Fine tiuj problemoj prokrastas repagon al Bruno de fakturo pro la sendo de la lasta LEGI. Bruno esperis ricevi repagon ĉi tage sed komprenas la situacion kaj konsentas plu atendadi.

- **Bernardo** renkontis nian amikon Jean-Claude BOT. Ankaŭ **Joël** donas novaĵojn pri li. Efektive Jean-Claude loĝas nun en Libourne, kie li retrovas malnovajn amikojn kaj li revizitas la Galgonan E-grupon.

- **Elvezio** aludas pri la kursoj en la Universitato: restas nun 3 studentoj el la jarkomenca grupeto; inter kiuj du ne el la Universitato. Informoj estas disdonitaj. Kelkaj studentoj perrete mem studas aŭ almenaŭ informiĝas. Cele akordiĝi kun semajnploj de diversaj interesatoj, ŝanĝiĝis la tago de la kursoj: Merkrede je la 17a30 en salono D009.

Bernardo memoras pri kamaradino, kiu sekvis tiaman oficialan kurson de Pierre Janton en Clermont-Ferrand; tiam la kursoj estis agnoskitaj kaj donis poentojn por diplomiĝo.



Martine daŭrigante pri kurso anonas novan lernantinnon en Montendre, Maggy Couzinet, kiu aliĝis al Esperanto-Gironde.

Joël precizigas ke en Galgon venis nova lernantino ne ĉijare sed pasintjare; temas pri germandevena lernantino neemerita; ŝi jam parolas ankaŭ angle do por ŝi Esperanto aspektas facila; ŝi esprimis sian deziron vere lerni kaj do revenas ĉi jare al la kurso.

- **Elvezio** anonas novan manlibron preparatan de Marion Quenut kaj Christophe Chazarein el Tuluzo.

- Pri la Brel KD: disdonu! Marcelo instigas la grupanojn senhezite preni ekzemple-rojn el nia stoko kaj uzi ilin kiel propagandilojn al neesperantistoj kiel valoran donacon, frukto ankaŭ de Esperanto-Gironde.



- **Ĵanseb** taksas tradukenda el la angla la libron de Esther SCHOR *The bridge of words*. Li prezentas la libron kaj se vi mem deziras scii pli jen ligo pri recenzo en Esperanto:

<https://www.youtube.com/watch?v=tM2oWjveUPc>

- Por honori Zaza-n Marcelo proponas kelkajn bildojn. Unue ni spektas la filmeton *Esperanto estas mojosa* kun aktiva partopreno de Klemento, fidela studinto dum du jaroj kun Elvezio en la universitato, nun volontulo por TEJO en Roterdamo! Mojosa Jes, mojosa Esperanto-Gironde mojosu!

https://www.youtube.com/watch?v=bPU_JXEA1MA

- Sekve en la spirito de Zamtag' Marcelo parolas pri la kreo de la verda stelo, kiel signo de Esperanto. Kaj sur la bildoj pluraj



signo de Esperanto. Kaj sur la bildoj pluraj grupanoj laŭte legas kelkajn frazojn. Ekzemple Bernardo rolas la voĉon de Zaza. Sed ankaŭ Gloria, Joël, Monique, Martine kaj Bruno partoprenas en la malkovro de la historio kaj de la tiutema kanto *La fluanta tajdo* kun teksto de Antoni Grabowski. Kaj ni kunkantas! Rete ni atingas la originalon, kiu neniel rilatas al maro, nek stelo. Do Grabowski tute ne tradukis sed simple ver-

kis movadan tekston adekvatan por la melodio de *Tramp, tramp, tramp* (ne *Trump, Trump, Trump*, kiel kelkaj pretus kanti nun).

Konklude ĵus antaŭ la tagmanĝo ĴanSeb eldiras: «Do hodiaŭ ni lernis unu vorton (mojosa) kaj unu kanzonon (*La fluanta tajdo*)!»

* * *

Kiel kutime, Rose preparis por ni ĉiuj bongustan supon, kaj pladoj kaj salatoj rondiras ĉirkaŭ la tablo de mano al mano. Ankaŭ boteloj... kaj kukoj! Post la deserto ni kunkantas la Esperantan version de la Eŭropa Himno. Ĵanseb surmetis sian flavan veŝton kun la slogano de EDE sur la dorso: «Demokratio URĜAS en Eŭropo.»

Posttagmeze Elvezio proponas ekzercon dank'al la reto. Jen Sylvain Lelarge kaj lia korelativa danco por lerni la korelativojn. Filmeto en du partoj: <https://www.youtube.com/watch?v=mhOPzN1bSJM>
<https://www.youtube.com/watch?v=l-F5emhzLDI>
Amuze ni sekvas la ordonojn de la instruanto kaj samgestas... kiam ni sukcesis enkapigi la instrukciojn!



Danceto laŭ la leciono de Sylvain Lelarge.

Ĉar pluraj el ni ankoraŭ ne spektis la *TOP 7 des arguments CONTRE L'ESPÉRANTO chantés puis démontés* ni kun plezuro rigardas la komikan filmeton:

<https://www.youtube.com/watch?v=gEotjmurPq8>

Ĵanseb precizigas ke EDE venkis konkurson per tiu filmeto kaj li esperas, ke tiu sukceso ebligos ĝian televidan projekciadon.

Poste Elvezio malkovrigas al ni serion da kvin filmetoj el tipee.com/linguisticae. Ni spektas la kvinan, plej aktualan:

<https://www.youtube.com/watch?v=-ab1RUIdmBw&t=1s>



Pikniko sur la batalkampoj - Bulgara Esperanto Teatro

Kaj venas la propono, kiun Elvezio kun emocio prezentas: jen kvardek-minutan teatraĵon *Pikniko sur batalkampoj*. La teksto de Fernando Arrabal estis tradukita en Esperanto kaj prezentita de Bulgara Esperanto Teatro en 1987 en Zagrebo. Elvezio mem roludis la patron, iam, en la hispana originala lingvo.

Frandu mem tiun pripensigan absurdaĵon:

<https://www.youtube.com/watch?v=ieveSGVvXBI>

Antaŭ ol disiĝi ni decidis retrovi nin dimanĉon la 6an de januaro ĉirkaŭ la tiutagaj kukoj! Samloke ekde la 10a30! Ni tiam parolu pri projektoj...

Marcelo

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO EN CENON PALMER

LA 6an DE JANUARO 2019

je la 10a 30

Ceeŝtis: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Gloria Garagallo, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Maeva Sarlandie. Tagmeze alvenas H el ene Forget.

Senkulpigitaj: Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labb e, Jo el Lajus, Morine Stride,

Elvezio bonvenigas  ciujn kaj deziras al  ciu j bonan jaron.

1/  Sang o de banko

 Gi ne estas tute finfarita. Restas kelkaj detaloj.

2/ *Bridge of words* (libro de Esther Schor)

Jean-Seb jam parolis pri tiu libro pasintan fojon. Li prezentos  gin en venonta kunveno.

La libron akiris la universitata biblioteko.



3/ Lingvofesto en la universitato

Elvezio:  Gi okazos en marto.

Martine proponas, ke la temo estu «Esperanto, lingvo de E ropo».

Necesos la tparoliloj; Marcelo ilin kunportos.

4/ Projekto pri Esperanto  e CNED

Elvezio: En Madrido, UNED (hispana organizo simila al franca CNED) proponas instruon de Esperanto por la unua jaro. Maurice Juy kaj Guy Camy faris projekton, ke tiu instruo okazu anka   e CNED. Elvezio estas prilaboranta programon por proponi al CNED.

Yannick: La  efa malfacila o estas la verkado de la kurso.

Elvezio: Se la hispanoj konsentos, ni povos uzi ilian kurson.

5/ Pri Herzberg

Martine informi is pri la urbo, pere de Interreto.

Herzberg comptait 14 406 habitants en 2007. (Cenon en a 22 000). A cette  poque, il y avait un grand engagement de la part de la municipalit  en faveur de l'esp ranto. La ville est jumel e avec G ra, en Pologne.

Par ailleurs la ville est située en Basse Saxe, tout au nord de l'Allemagne, ce qui représente une très grande distance d'ici.

Martine s'est renseignée aussi sur les associations de jumelage en France : elles sont plutôt orientées vers la jeunesse.

Bernard: Il existe le dispositif Erasmus +, qui se fait en liaison entre une mairie, un établissement scolaire et un lieu culturel, et peut disposer de fonds européens. Mais est-ce que l'espéranto serait pris en compte dans ce dispositif ?

Martine: Organismes pouvant aider dans l'organisation d'un jumelage : Localtis, Caisse des dépôts, et OFAJ, FAFA pour un jumelage avec l'Allemagne.

Bernard: Il a existé un bulletin en espéranto des villes jumelées.

Martine: Si un jumelage n'est pas possible, on peut se contenter de simples échanges de groupe à groupe.

Marcelo: En 1992 okazis interŝanĝo kun grupo de Vitorio (Eŭskio). Tuta buso da gejunuloj venis al Bordojo kaj organizis diversajn animadojn. La eŭska grupo eldonis revuon *Eŭska kverko* kaj bultenon *Kuspe*.

La postan jaron, Espéranto-Gironde organizis perbusan vojaĝon al Vitorio.

Espéranto-Gironde antaŭe provis interŝanĝon kun Azerbajĝana grupo. Estis kelkaj leteraj interŝanĝoj. En la jaroj 1986 ĝis 1995 okazis ankaŭ interrilatoj kun grupo en Düsseldorf, kun interŝanĝo de revuoj. La duseldorfa revuo nomiĝis *la Radsaltanto*.

Kun Azerbajĝano la interŝanĝoj estis malfacilaj.

Kelkaj individuoj el Vitorio daŭre ricevas LEGI kaj partoprenas aranĝojn organizitajn de Espéranto-Gironde.



6/ Diversaj aferoj

- **Klodin'** ricevis telefonavokon de Lucette Echappé, kiu celas reaktualigi la nomojn de la grupoj, kiuj organizas kursojn. Eble aperos io pri Espéranto-Gironde en iu venonta SAGO.

La prezidanto kaj la kassistino partigas la bon-gustegan supon de Rose.

- **Klodin'** parolas pri retmesaĝo sendita de Esperanto-Lozère, kiu informas, ke pola grupo (trideko da diversaj artistoj) venos en Francion en junio 2019, kaj petas grupojn por organizi turneon.

Post diskuto pri la disponebleco de la membroj kaj la organizebleco, ni alvenas al tio, ke ni devas rezigni pri la partopreno de Espéranto-Gironde en tiu projekto.

- **Elvezio** konatiĝis en Bordojo kun beninano, profesoro pri la franca lingvo; tiu homo starigis asocion inter Francio kaj Benino (liceo de Porto-Novo) por starigi projekton pri lingvoj. Tiu profesoro montriĝis tre interesata pri Esperanto. Li intencas aperigi bultenon de sia asocio, en kiu Elvezio povus havi paĝon por paroli pri Esperanto.



Bunta tablo por la reĝfesto

Cetere, Mireille Grosjean loĝas en Cotonou du monaĵojn jare kaj tie zorgas pri Esperanto-agado. Elvezio havis la okazon paroli kun ŝi en Madrido (ILEI-Konferenco).

En Porto-Novo ne ankoraŭ ekzistas asocio pri Esperanto.

- **Klodin'**: La SAT-kongreso okazos en Barcelono de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto. (Vd aliĝilon p.15-16)

- **Marcelo**: Veganoj serĉas lokon, antaŭ aŭ post la kongreso, kie eblos prepari manĝojn, organizi aranĝojn, koncertojn, prelegojn, ktp por tuta memstara grupo, en suda Francio. Pasintan jaron, tiu renkontiĝo estis organizita en Grésillon.

Post la manĝo, ni plurteme diskutas, interalie pri gramatikaj demandoj. Janine prezentos iom post iom la tezon de Georges Lagrange pri la semantika karaktero de la radikoj, en venontaj kunvenoj.

Ni ankaŭ kunkantas la esperantajn vortojn proponitajn por la eŭropa himno kaj kelkajn kanzonojn de Kajto.



La venonta kunveno okazos la 3an de februaro.

Janine



Interesa ligilo komunikita de Jean-Seb : Zamenhof.info - L. L. Zamenhof, l'initiateur de la langue internationale espéranto

MIA KONGRESO EN LISBONO

Lisbono, la urbo, estas tre bela pro malgrandaj stratoj, domoj kun diversaj koloraj mozaikaj fasadoj, malnovaj tramoj... Sed estis ankaŭ tre varme. Oni devis al kutimiĝi al varmego je ĉirkaŭ 42 gradoj. Lisbono estas la urbo, la maro, la kampo, la suno, la kulturo kaj tre afablaj homoj. Precipe Esperantistoj estas afablaj homoj.

Fine de julio, multaj Esperantistoj ĉeestis la 103-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018 en Lisbono (Portugalujo).

La unuan fojon mi ĉeestis Esperantistan kongreson.

Estas ĉiam ĝojo vidi aliajn Esperantistojn. Kiam mi alvenis al Universitato de Lisbono, mi retrovis la esperantistan familion. Mi povis renkonti multajn homojn kaj, kompreneble, paroli Esperante. Dum iu tagmanĝo, serĉante lokon por manĝi, kaj petinte sidlokon, iu ĉe la tablo respondis: «Ni atendis vin» kaj ni parolis kvazaŭ ni estus amikoj de longa tempo. Estis tre bele povi paroli kun alilandanoj tiel frate kaj, plie, la tagmanĝo en universitato estis vere malmultekosta tamen bongusta.


Oni povis elekti: kursojn, prelegojn, ekskursojn, kaj aŭ ekzamenojn. La aktivaĵoj estis tre diversaj prelegoj pri landoj, scienco, religio, kulturo, kino aŭ naturismo, klasikaj koncertoj, Esperantaj kantoj, ktp.

Mi ĉeestis plurajn prelegojn: «artoj kaj esperanto», «lerni per tradukado», «varsovia radio kaj kulturo», «interlingvistikaj atingiĝoj», ktp. Mi aŭskultis kelkajn tre interesajn prelegojn kaj aliajn tro malfacile kompreneblajn.

Du elstarajoj en la ekskursoj en Portugalio: mi iris al la arta muzeo de Lisbono. Estis provizora ekspozicio pri portreto. Mi ŝatis la pentrartojn pri portreto, la specialan konceptadon en la portugala kolonia periodo kaj filmojn pri portretoj de turmentitaj homoj en la tempo de la diktaturo de Salazar. Interesa sed tre malĝoja, homoj ekkriis en la salono de projekcio...



Vidaĵo de Lisbono



Puto de la Quinta de Regaleira


La dua momento estas la malsupreniro de la esotera puto en la Quinta de Regaleira en Sintra (norde de Lisbono). Post malsupreniro al elipso de tre profunda puto mi metis min en la centro. Mi rigardis mian centron kaj poste supren la mondon...

Mia «magdalena kuko» de Proust (*) en Lisbono: konkoj de malgranda restoracio...

Mi jam pensas pri la venonta Kongreso...

Aŭroro

(*) Ĉi tiu esprimo aludas tiujn malgrandajn odorojn, sentojn, agojn, kiuj subite elprenas el la profundoj de niaj malproksimaj memoroj ofte multajn emociojn. En la libro de Marcel Proust *Sur la vojo de Swann*, la unua volumo de *Reserĉe al la perdita tempo*, la aŭtoro elvokas memorojn. Por varmigi lin, lia patrino trinkigas al li teon kaj manĝigas kukon. La gusto de ĝi trempita en teo, kaŭzas al li intensan senton, kiu memorigas al li malnovan tempon, kiam li vivis en Combray, lia onklino Leonie igis lin gustumi pecon de kuko trempita en ŝia infuzaĵo. Magdalena kuko estas speciala franca kuketo, kiu havas specifan aspekton.



Alia interesa ligilo komunikita de Jean-Seb : [Adresaro de la Esperantistoj - Vikipedio](#)

Kelkaj «prabordozanoj» estas tie troveblaj...

77a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO 51a KONGRESO DE ILEI

De la 20-a ĝis la 28-a de julio, mi partoprenis tiujn du eventojn, en Madrido, kiuj okazis samtempe: unue la Hispanan Kongreson (20a - 21a) poste la ILEI Kongreson, en la sama loko: la sidejo de la Nacia Neĉeesta Universitato (UNED: Universidad Nacional de Educación a Distancia).

Partoprenis entute 250 homoj, el pluraj landoj: la plejparto el ili ankaŭ partoprenis poste la UK-on en Lisbono, kiu okazis ĝuste post tiuj madridaj eventoj. Aparte okazis, ene de ILEI, la Simpozio pri Kultura heredaĵo de Esperanto (dum la du lastaj tagoj: 26a - 27a de julio).

Kadre de tiu-ĉi simpozio, mi prelegis pri la poemo de Federico García Lorca: *La monaĥino ciganino* (*La monja gitana*), kiun mi elektis okaze de la poeziofestado dum nia kunveno (en marto, se mi bone memoras, en Cambes) (vd. p.12) ⁽¹⁾.

Partopreni tiujn eventojn ebligis min konatiĝi kun pluraj hispanaj esperantistoj, kaj ekscii pri la aktivecoj de la hispana movado. Fakte, ili estas tre aktivaj, kaj havas tre bonan lingvan kaj kulturen nivelon. Mi ankaŭ eksciis, ke ene de la lingvokursoj de la UNED, Esperanto estas instruota ekde la komenco de la universitata kurso de 2018-2019 (do, ĝi jam komenciĝis). Kelkaj francaj samideanoj ŝatus fari la samon en Francio per la CNED. Mi esploras tiun vojon, aktuale.

Kiel kutime, pluraj paralelaj prelegoj okazis, kaj pri la hispana historio, kaj pri la instruado de Esperanto. Aparte konsiderinda estas la agado de la kolegoj de la Universitato de Sevilio, kiuj ne nur instruas Esperanton sed eĉ starigis katalogon de la instruado de nia lingvo en la universitatoj de la tuta mondo. Kompreneble, ankaŭ nia universitato aperas, kaj mi bone rilatis kun tiuj kolegoj.

Kiel kutime, pluraj paralelaj prelegoj okazis, kaj pri la hispana historio, kaj pri la instruado de Esperanto. Aparte konsiderinda estas la agado de la kolegoj de la Universitato de Sevilio, kiuj ne nur instruas Esperanton sed eĉ starigis katalogon de la instruado de nia lingvo en la universitatoj de la tuta mondo. Kompreneble, ankaŭ nia universitato aperas, kaj mi bone rilatis kun tiuj kolegoj.

Okazis ankaŭ pluraj aranĝoj: la koncertoj de Kaj Tiel Plu, de Kajto (duope) kaj de la fama madrida Plektro-muzika grupo «Calle del Barquillo», kun la partopreno de la tenoro Miguel Fernández, eminenta hispana esperantisto, poeto kaj tradukisto.

La ekskurso en Alcalá de Henares ebligis nin viziti la naskiĝdomon de Miguel de Cervantes kaj la faman universitaton, fonditan fare de la fama





Miguel Fernández deklamas poemojn de Miguel Hernández

kardinalo Francisco Jiménez de Cisneros en 1504. Tre interesa vizito okazis en la Okcidenta Parko (Parque del Oeste), tra la scenaro de la fama batalo de Madrido, dum la interna milito (1936-39). Toño del Barrio, prezidanto de la Hispana Esperanto Federacio (HEF) prelegis antaŭ la vizito pri la graveco de la esperantista movado dum la milito.

Poste, ni promenis tra la parko, kiu troviĝas tre proksime al la kongresejo. Miguel Fernández (la tenoro, i.a.) deklamis kelkajn poemojn de la fama hispana poeto Miguel Hernández (ne konfuzu...), kiujn li mem tradukis. Li faris tion antaŭ la statuo de la poeto en la parko: tre kortuŝitaj estis ni ĉiuj!

Alia tre interesa vizito okazis ĉe la Instituto de la kultura heredaĵo de Hispanio, kiu ankaŭ troviĝas tute proksime: ĝi apartenas al la Ministerio pri Kulturo de Hispanio, kaj estas dediĉita al la esplorado, konservado, dokumentado kaj diskonigo de la kultura heredaĵo.

Elvezio



Ekskurso al Alcalá de Henares: bone akompanata.

⁽¹⁾ En la venonta numero aperos la teksto de la prelego de Elvezio pri la du esperantaj tradukoj de La monja gitana de Federico García Lorca..

Federico García Lorca, « La monaĥino-ciganino » (el *La cigana romancaro*, 1928)

Silento el kalk' kaj mirto.
Inter herboj fajnaj malvoj.
Monaĥin' sur ŝtoko flava
Brodas bele keirantojn.

La sep birdoj de la prismo
Flugas el la kandelabro.
La preĝejo diste grumblas
Kiel urs' sur dorso-staro.

Kiel bele ŝi ja brodas!
Kiom lindas la brokaĵoj!
Volas ŝi sur ŝtoto flava
Brodi florojn el la ravo,
Kiujn ŝia fantazio
Revas per la flor-ornamoj.

Kiaj fajnaj sunofloroj,
Magnolioj kun bunt-strasoj!
Kiaj lunoj por mes-tukoj!
Kiom belaj la safranoj!
Kvin citronoj sukr-dolĉigas
Tie, en kuirej-parto.

La kvin vundoj de Jesuo
El la Almeria kampo.
En la monaĥin-okuloj
Galopadas du rajdantoj,
Kaj rumoro lasta surda
Levas de ŝi la korsajo.

Ŝi rigardas krutajn montojn,
Horizonton kaj nubaron,
Ekrompiĝas ŝia koro
El suker' kaj herb-balzamo.
El la dudek-suna revo
Kiel vidas ŝi la valon!
Kiom staraj la riveroj
Belaj kiel viziaĵoj!

Sed ŝi daŭre brodas
Ŝiajn florojn kun ĉarmo,
Dum la brizo milde staras
Kaj taglumo ludas ŝakon
Alte tra la ĵaluzio
Kie svenas milde tago.

(Tradukis el la hispana: Antonio
Marco Botella)

Silento mirta kaj kalka.
Malvoj inter herbaj tigoj.
nun la monaĥino rozon
Brodas sur pajleska lino.
En la griza lustro flugas
la sep birdoj de la prismo.
La preĝejo fore grumblas
kiel urso sur la spino.
Kiel bele ŝi brodadas!
Kaj sur la pajleska lino
Florojn ŝi sopiras brodi
En la propra fantazio.
Kiaj sunoflor' kaj strasa,
bantorica magnolio!
Kiaj steloj kaj safranoj
Por mes-tukoj de la kirko!
Kvin citronoj sin dolĉigas
en la kuireja niĉo.
El kampar' de Almerio.
En la monaĥin-okuloj
Tragalopas du rajdistoj,
kies surda, lasta zumo
De ŝi levas la ĉemizon.
Nubojn, montojn ŝi rigardas
en la krutan malproksimon,
Kaj rompiĝas ŝia koro
el suker' kaj glicirizo.
Kiajn riveregojn starajan
vidas ŝia fantazio!
Kian lumon dudek-sunan
Super ebenaj' en klino!
Se ŝi sian floron brodas,
dum piede en la brizo
la taglumo ŝakon ludas
Alte tra la ĵaluzio.

(Tradukis Fernando de Diego)

Silencio de cal y mirto
Malvas en las hierbas finas.
la monja borda alhelies
Sobre una tela pajiza.
Vuelan en la araña gris,
Siete pájaros del prisma.
La iglesia gruñe a lo lejos
Como un oso panza arriba.
¡Qué bien borda! ¡Con qué gracia!
Sobre la tela pajiza,
ella quisiera bordar
Flores de su fantasía.
¡Qué girasol! ¡Qué magnolia
De lentejuelas y cintas!
¡Qué azafrañes y qué lunas,
En el mantel de la misa!
Cinco toronjas se endulzan
En la cercana cocina.
Las cinco llagas de Cristo
cortadas en Almería.
Por los ojos de la monja
galopan dos caballistas.
Un rumor último y sordo
le despega la camisa,
y al mirar nubes y montes
en las yertas lejanías,
Se quiebra su corazón
de azúcar y yerbaluisa.
¡Oh!, qué llanura empinada
con veinte soles arriba
¡qué ríos puestos de pie
vislumbra su fantasía!
Pero sigue con sus flores,
mientras que de pie, en la brisa,
La luz juega el ajedrez
alto de la celosía.

(Federico García Lorca, *La monja gitana*)



Korusemuloj...

**Kantemuloj...
Muzikemuloj...**

Venont-**v**intre venu en **Arjeĵ**ujon

por tutan **semaj**non plurvoĉe **kunkant**adi...

De **2-a** ĝis **9-a** de **marto 2019** en

26-a (ĵa jame!) **Staĝo de Tut-P.E-Ko** (Tut-Pirenea Esperanto-Koruso)

...sub gvido de Nederlandanino el la kant-grupo « **AKORDO** » :



Rineke HOENS

korusestros **divers-nacian**

(ankaŭ **divers-nivelan**) aron

da (ne-)E-scipovantaj ge-**korus**anoj

en **divers-epoka** kaj **divers-stila**

E-repertuaro (originala & tradukita).



Ni ĉiutage **kantos 5 horojn** kaj povos plie turismi, debati, ludi, lerni E-on... laŭplaĉe, ev. skii kaj krome pluraj **partoprenontoj ankaŭ folk-muzikemaj** alportos siajn instrumentojn por ev. ludi kun lokuloj : Gérard, Patrick, Alyson & aliaj.



Pliajn informojn bv. peti de **JORGOS** :

tel-n° 33 / 0 468 605 417

aŭ **ret-adrese** ĉe : tutpeko@aliceadsl.fr.

C.E.E.A. (Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège)
Mairie – FR - 09340 VERNIOLE

26-a KORUSO-STAĜO



en **Esperanto** kun **skiado**, **turismo**
& kun **folk-muzik-aj inter-ŝanĝoj**
de **sabato 2-a ĝis**

sabato 9-a de marto 2019

en feriejo de **La Bastide/l'Hers** (Arĝejo),
en katarisma Nord-Pirenejoj

Korusa laboro sub gvido de

nederlanda **Rineke HOENS**

ŝi hejmlande regule korusistras por kvar grupoj.

Plurvoĉaj kantoj el diversaj tempoj & teritorioj

Lauktume pluraj partoprenantoj alportos
siajn **muzik**-instrumentojn por **folk-lud-**
adi laŭeble ankaŭ kun lokaj spertuloj.

Iuj komencantoj en **E** kaj akompanantoj de
konusanoj ricevos **E-kurson**, ĉu ankaŭ vi ?

Programo : ĉiutage 5 horoj da kanto, da
kultur- / turism-aj vizitoj, ekskursoj & vesperaj
ludoj, debatoj, spektakloj, ktp.

Akcepto : ekde sab., 2-an de marto je la 15-a h.
Staĝ-eko : dimanĉe, 3-an de marto je la 9-a horo.
Staĝ-fino : sab., 3-an de marto je la 15-a horo.

Aliĝo-kondiĉoj : CEEA-amigo (pro asocia asokuro) :
normale: 16 €; rabatte: 11 €, paro: 24 €, infanoj: 5 €

Enskribiĝo por la semajno : malplikoste se
pli frue, pli junaĝe aŭ plurope el sama familio.

! ? Kiu → Plenkresk. → 26-jara aŭ → 16-jara aŭ			
! Kiam ?		2-a persono	3-a persono
→ 31 okt.	75 €	60 €	45 €
→ 31 dec.	90 €	75 €	60 €
Poste...	105 €	90 €	75 €

Rimarko : akompanantoj, kiuj restadas sen staĝumi
ne pagos enskribiĝon krom infanetoj bezonantaj
apartan prizorgadon.

Por ununura tago, kun mango : 30 €

Restad-kostoj :

7 x 24 horoj (nokto + 3 mangoj) : 301 €
Sen Tag-Mangoj : 231 €.

Aliaj eblecoj (elz. Solidarece) : petu apartajn tarifojn.



ALIĜILO :

Vok-Nomo :
FAMILIA NOMO :
Adreso :
Land-&Poŝt-Kodo : URBO :
Tel-N^o :
@dreso :

Mi alvenos -an de februaro je lah.....
- en La Bastide/H / / ; sag-ŝildoj indikos vojon !
Estas liberaj sid-lokoj en mia aŭto ek de (urbo)
..... kaj mi pretas veturigi iu(j)n alia(j)n

Mi alvenos trajne en Toulouse/Pamiers je
la-a h. (sekve buse en *Laroque d'Olmes*)
aŭ en *Bram* je-a h.

Mi enskribiĝas, kiel : *akompananto / _ /
***korusano** / _ / basa / _ / tenora / _ / alda / _ /
soprana / _ / **komencanta** / _ / **konfirmita** / _ /
Mi leg-kapablas : - Eon / _ / , se "ne" indikiĝos prononco)
- Muzikon / _ / , deziras jam ricevi partiturojn / _ /
* amatora **muzikemulo**, ludanta-on
* **E^o-komencanto** & **deziras baz-progresig-an kurson** / _ /

Ĉi-kunus mia pago (elo al CEEA - CCP n^o 257 934 E Toulouse) per :
1) **Aniĝo** ĉe CEEA (dévige) €
2) **Enskribiĝo** je l'staĝo €
3) **Restad-kosto** €, **antaŭpago 10%** €
4) **Donaco laŭvola** €
5) **Sumo** € ; **hodiaŭ pagataj** €
6) **Restos** por pagi je alveno €

Okaze de rezigno repageblas nur enskribiĝ-kostoj
ĝis de 30-a nov. & **MONIK**-kostoj ĝis 15-a de Jan.

Ĉian sendaĵon al : **MONIK** Garrigues – Muelejo –
FR - 09 600 LIMBRASSAC – Informoj ĉe Jorgos
Tel 33/0 468 605 417 ; rete <tuupeto@alliceads.fr>

Pliaj ideoj, proponoj, petoj :
..... (& dors-flanke, dankon !)



Aliĝilo

Personaj datumoj

Bv. nepre respondi la demandojn kun steleto ().*

Persona nomo*: Familia nomo*:
 SAT-Matrikulo: Lando*:
 Poŝtkodo*: Urbo*:
 Strato*: Numero*:
 Telefono: Retadreso:

Mi bezonas invitolon kaj kontakto OKK por individua traktado. JES () / NE ()

Protekto de la privateco

Bonvolu klare indiki vian konsenton au malkonsenton pri la jenaj punktoj:
 Mi konsentas, ke miaj nomo kaj adreso aperu en la kongreslibro*: JES () / NE ()
 Mi konsentas, ke miaj nomo kaj retadreso aperu en la kongreslibro*: JES () / NE ()
 Mi konsentas, ke miaj fotoj el la Kongreso aperu rete*: JES () / NE ()
 Mi konsentas, ke miaj fotoj el la Kongreso aperu surpapere*: JES () / NE ()

Kotizoj (eŭroj)

<u>Aliĝo pagita antaŭ dato¹:</u>	<u>15.01.2019</u>	<u>28.02.2019</u>	<u>30.04.2019</u>	<u>30.06.2019</u>	<u>Poste</u>
SAT-membro	40 €	45 €	50 €	55 €	60 €
SAT-junulo (ĝis 25-jara)	15 €	20 €	25 €	30 €	35 €
Ne-membro de SAT	50 €	55 €	60 €	65 €	70 €
Juna ne-membro de SAT	20 €	25 €	30 €	35 €	40 €

Familiano, koramik(in)o, aŭ nepra akompananto pagas **50% de la respektiva kotizo**, kiun li/ŝi pagus aliĝante sola.

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon.
- Aliĝantoj el Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Litovio, Latvio, Pollando kaj Slovakio ĝuas 30% rabaton
- Aliĝantoj el Albanio, Bulgario, Rumanio, eksa Jugoslavio (krom Slovenio), kaj eksa Sovetunio (krom Estonio, Litovio kaj Latvio) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Izraelo, Japanio, Korea Respubliko, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50% rabaton.
- Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.
- La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la kongreson.
- La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.
- Aliĝilon kaj mendon de loĝado sen pago de la kotizo la OKK ne traktos.

Pri kotizo mi pagas:€

¹

La aliĝo validas nur post kompleta pago de la kongreskotizo. La kotizo dependas de la dato de pago.

Loĝado

La gastejo "Martí Codolar" (marti-codolar.salesians.cat) estas malmultekosta, socie engaĝita kaj kun ĉiu rimedo bezonata por bonege kongresumi.

Mi alvenos la..... de aŭgusto.
Kaj mi foriros la ... de aŭgusto
Do mi mendas noktojn

Prezoj po nokto (inkluzive de la urba turisma imposto + matenmanĝo):

Unuopa ĉambro kun privata necesejo:	60 €
Duopa ĉambro kun privata necesejo:	70 € (po 35)
Kvaropa ĉambro kun privata necesejo:	100 € (po 25)
Lito en kvaropa ĉambro kun etaĝ-litoj sen privata necesejo:	19 €

Senpaga tendumado en memmastrumata bieno Can Masdeu (2 metrohaltejoj for de la kongresejo)

Mi kunloĝos kun:

Pri loĝado mi pagas entute:€

Manĝado

Temas pri kataluna tradicia manĝaĵo per bufedo sen tablo-servado. Trinkajaĵoj inkludas akvon kaj ruĝan vinon. Ni ĉiuj devas preni la telerojn kaj kunporti ilin al la tabloj, kaj same poste rekonporti ilin apud la rubujo.

Mi estas ĉionmanĝanto JES () / NE ()

Mi estas vegetarano JES () / NE ()

Mi estas vegano JES () / NE ()

Mi havas alergion/netoleremon: JES () / NE () Kiun?.....

Tagmanĝo: 12 €

Vespermanĝo: 12 €

Do mi mendas tagmanĝojn kaj vespermanĝojn. (bv skribi kiom da)

Pri manĝado mi pagas entute:€

Pagmanieroj

Por la kotizo mi pagas entute €.

Por la loĝado mi pagas entute..... €.

Por la manĝado mi pagas entute €.

Donaco al la kongresa kaso : €.

SUME mi pagas entute:€

Mi pagos per mia UEA-konto al satx-s

Mi pagos per mia landa peranto de SAT

Mi pagos al bankokonto de SAT: Poŝtkonto de SAT n-ro 1234-22 K, La Banque Postale, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Mi pagos al bankokonto de la OKK ĉe Caixa d'Enginyers: IBAN: ES92 3025 0002 4414 3341 8798

BIC: CDENESBBXXX

Loko, dato _____

Aliĝanto (subskribo) _____

Kontribuo al la programo

Mi povas kontribui al la kongresa programo per: _____

Prelego (temo): _____

Debato / diskutrondo (temo): _____

Kultura programero (priskribo): _____

Alitipa programero (priskribo): _____

Notu bone, ke la kongrespago inkluzivas nenium asekuron. Ĉiu memstare prizorgu tion.

Bonvolu sendi aliĝilon kaj por pliaj informoj, skribi al satbarcelono2019@gmail.com

Ĉio rilata al pagoj estu kopie sendita al financoj@satesperanto.org

EL LA FLORARO DE MARCELO...

Borago officinalis
Bourrache officinale
Boragacoj



20-70cm
apr-sep - unujara

Oficina borago

Boragon kultivas legom-
ĝardenistoj kiel aldonajon al
salatoj. Ĝi havas odoron kaj
guston de kukumo.

Dum Antikvaj tempoj ĝi laŭdire
fortigis kaj ĝojigis. En la 16a
jarcento ĝin oni uzis kiel
kardioaktivigilon. Hodiaŭa
fitoterapio uzas esencon eltirita el
ĝiaj semoj por helpi al kuracado
de haŭtmalsanoj.



6



Frukton de borago
formas kvar akenoj
enhavantaj tuber-
kuletojn riĉaj je
nutraj substancoj.
Formikoj kolektas
tiujn fruktojn por
sin nutri per la
tuberkuletoj kaj tiel
favoras dissemadon
de borago.





Kie oni vidas, kiel Izengreno deziris konvertiĝi kaj kiel li estis ordinita monaĥo de la abatejo de Tyron

Fine Renardo, kun pripensita ideo, decidis respondi al la vizitanto.

- Kiu vi estas, ĉi supre?
- Mi estas mi.
- Kiu vi?
- Via kunulo.
- Ha, mi rigardis vin kiel ŝteliston.
- Kia mistakso! Estas mi. Malfermu la pordon!
- Almenaŭ atendu ke la fratoj, manĝinte, forlasis la tablon.
- Ĉu fratoj? Ĉu monaĥoj estas ĉe vi?
- Ja, aŭ pli ĝuste veraj kanonikoj; tiuj el la abatejo de Tyron, filoj de Sankta Benedikto, kiuj favore akceptis min en sia ordino.
- Nomededi'! Nu, vi gastigos min hodiaŭ kaj donos al mi ion por manĝi, ĉu ne?
- Tutkore. Sed antaŭe respondu: ĉu vi venis ĉi-tien kiel almozulo?
- Ne, mi venas por ricevi novaĵojn pri vi. Malfermu la pordon!
- Vi petas ne eblan aferon.
- Kial?
- Vi staras en ne taŭga stato.
- Mi staras en stato de granda apetito. Ĉu ne estas viando, tio kion vi kuiras?
- Ha, kara onklo! Vi ofendis nin. Vi bone scias, ke religiuloj votis rezigni ĉiajn karnajn aferojn.
- Kaj kion manĝas viaj monaĥoj, ĉu molajn fromaĝojn?
- Ne, ne precize; sed delikatajn kaj grasajn fiŝojn. Nia Patro Sankta Benedikto eĉ admonas ĉiam elekti la plej bonajn.
- Jen novaĵo por mi. Tamen tio ne malhelpu, ke vi enirigu kaj gastigu min ĉi-nokte.

- Mi ja bonvolus: malbonŝance necesas por eniri esti ordinita monaĥo aŭ ermito. Vi ne tia estas. Bonan vesperon! Iru for!

- Ha, jen malafablaj monaĥoj! Mi opiniis ilin pli bonkoraj; tamen mi eniros malgraŭ vi. Neeble! la pordo estas tro fortika kaj la fenestro riglita. Kunulo Renardo, vi menciis fiŝaĵon, mi ne konas tiun viandon. Ĉu ĝi bongustas? Ĉu peceton mi povus ricevi, nur por gustumi?

- Tre volonte, kaj benita estu angilokapto, se vi bonvolas manĝi el tio. Tiam li prenas de sur braĝoj du tranĉetojn perfekte rostitajn, manĝas la unuan kaj alportas la alian al sia kunulo.

(daŭrigota)



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 14h30 à 16h30, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le lundi 15h30 à 16h45 (TAP), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

**Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

**La venonta kunveno okazos la 3an de februaro je la 10a 30 ĉe
Jean-Seb, 18 ter avenue du Port Aérien, 33600 Pessac.**

